Carlos, frato, ni ne forgesas

Hodiaŭ, 11a de novembro de la 2007a, ili forrabis lin al ni. Hodiaŭ la faŝistoj forrabis vivon de kamarado, de amiko, de Karlos. Madrida 16jara knabo hodiaŭ ne revenos hejmen nur por rifuzi la rasismon kaj reagi kontraŭ la ksenofobaj atakoj, kiujn ni vidis lastatempe per la komunikadmedioj, inter aliajn al konga viro, kiu rezultis paraliza, en *Alcalá de Henares*, plurajn batadojn al enmigrintoj en *Pio XII* kaj en *Las Rozas,* la agreson ĉe la Barcelona metroo...

Ĉimatene estis alvokita superdreksta kaj ksenofoba manifestacio ĉe la laborista kvartalo de *Usera*. Nia kamarado, same kiel la aliaj kontraŭfaŝistoj, kiuj ĉeestis la metroon, nur deziris montri al tiuj faŝistoj, ke la naskiĝloko de homo ne estas kialo por juĝi ĝin kaj ke ĉe la laboristaj kvartaloj ne estas bonvenaj la rasismaj sintenoj.

Per tiu ĉi komunikaĵo ni deziras denoncii, ke nuntempe ĉe Madrido, en la hipoteza demokratio, kiun ni vivas, estas rasismaj manifestacioj permesataj kaj protektataj de la "aŭtoritato" kaj krome ĝiaj partoprenantoj estas homoj armitaj per ĉasponardoj, kiel la murdisto de Karlos.

Bedaŭrinde tio ne estis ĉio. Ĉe la sama agreso alia kamarado estis ponardita en la pulmo, kaj nun li sin trovas ĉe hospitalo je tre danĝera stato, kvankam stabila. Ĉar tio ne sufiĉus, la polico decidis protekti la rasistojn kaj ataki la kontraŭfaŝistojn per bastonoj kaj gumklugoj. Dum tiu atako alia kontraŭfaŝisto estis vundita de la agentoj de "Leĝo kaj la Ordo", kiuj poste arrestis lin.

La amasmedioj klopodas kaj klopodos prezenti la aferon kiel interbarakton inter kontraŭstarantaj bandoj. La vero estas tre malsimila por tiuj, kiuj kuraĝas rigardi ĝin vidalvide. Tiuj ĉi agresoj aldoniĝas al la vico de viktimoj, kiujn la faŝismo kaj la rasismo kaŭzis tra la tuta historio. La vundo inter la du Hispanioj estas tre viva por multaj, kvankam oni klopodas kaŝi ĝin per iu duonvarma kaj senkompleta leĝo.

Ne estis morto kaŭze de pandobarakto, Karlos estis murdita, ĉar li defendis la laboristan klason sen rimarki la koloron de la haŭto aŭ la landon de deveno.

Hodiaŭ ni ploras lian morton kaj ni neniam povos forviŝi la doloron de nia memoro.

Fine, dankon al ĉiuj gekamaradoj, kiuj dum la tuta tago suferis kaj tenadis kune kaj organize. Dankon al la gekamaradoj ektermadridaj, kiuj el la distanco sendis sian solidarecon al la madrida kontraŭfaŝista movado, sed super ĉio dankon al la genajbaroj de la kavartalo de *Usera,* ĉar ili plenigis la stratojn, ĉar ili, kiam ili vidis la rasistojn, ne silentis. Ĉar per sia ekzemplo ili rajtigas nian lukton.

Neniun ŝancon al la faŝismo!
Neniun agreson sen reago!
La plej bona omaĝo estas daŭrigi la lukton!